travivinta la alian duonon!" Ekzistas ankaŭ intermezaj opinioj. La servisto de la fama franca biologo kaj ĥemiisto Luizo Pasteŭro devis veki sian ĉefon ĉiumatene per la vortoj: "Sinjoro profesoro! Forskuu la demonon de malvigleco kaj neagemo!" Kaj la servisto de la sociala reformanto *Saint-Simon* ellitigis sian mastron per: "Grafa moŝto! Levu vin! Vi devas plenumi grandajn taskojn!" (2004-04-14)

### Ovoformaj ovoj

La tipa ovoformo de ovo estas la rezulto de la demetproceso. Komencvoje tra la ovodukto, la ŝelo ankoraŭ estas mola kaj ronda. Dum la transportado pli kaj pli da kalko adheriĝas, kaj la kontraktado de la ringmuskoloj donas al la malantaŭa parto la konusan formon kiu plifaciligas la finan demet-proceson. En la nesto tiu formo havas la avantaĝon, ke la ovoj pli malvaste kune kuŝas unu apud la alia kaj povas esti pli efike varmigitaj de la kokino. Kaj kiam ili hazarde estas movataj, nu, ovoj ne tiom facile forruliĝas sed turniĝos ĉirkaŭ sia mallarĝiĝinta ekstremaĵo.

**Redaktora postrimarko.** Rilate al la graveco de kokinaj ovoj por homa nutrado ĝenerale, aldonendas plia rimarkebla observado konekse de la supraj priovoformaj sciindaĵoj: La ovoj, en la fluo de pluevoluado, perfekte adaptiĝis al la formoj de niaj mastrumaj ovingoj kaj ankaŭ al la formo de la ovo-deponejoj interne de niaj kuirejaj fridujoj… (2004-04-3/4)

### La plej aĝaj arboj

Ĝis la jaro 1954 oni opiniis, ke la kaliforniaj mamut-arboj estus – kun 3200 ĝis 4000 jaroj – la plej aĝaj arboj de la mondo. Sed poste iu biologo malkovris, ke la "aristo-pinoj" de *White Mountains* (oriente de la kalifornia *Sierra Nevada*), estas pli aĝaj: je ties kreskoloko, en alto de 3000 ĝis 3400 metroj, la precipitaĵo estas nur 200 mm/jare – plej ofte nur forme de neĝo. Pro tio la kreskadofazo de la arboj estas nur 3 monatoj/jare. Tio signifas, ke la aristopinoj post 500 jaroj estas ankoraŭ "junaj arboj". Studento, kiu 1964 rajtis dehaki studcele ekzempleron de tiuspeca *Pinus aristata longaeva* nombris la jarajn ringojn, kiuj ja informas pri la aĝo: unu jarringo egalas al unu vivojaro. Li do studis detale kaj profunde la cirkule aranĝitajn kreskoindikajn ligno-sekvencojn – kiuj fine sumiĝis al 4844 jarringoj! La metuŝelaĥo inter la germanaj arboj estas kverko en la bestoĝardeno *Ivenaker* ĉe *Stavenhagen* en la provinco Meklenburgio-Antaŭpomerio, kies aĝo estas taksata je 1200 ĝis 1500 jaroj. (2004-06-11)


# Scienca Revuo Vol. 56 (2005)(1) / n-ro 200

*Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)*

Hejmpaĝo: http://www.eventoj.hu/isae/

**Pres-indikaĵoj** : ISSN 0048-9557. Eldonanto: ISAE
Laserkopiita : Marto 2005 ĉe *Copy & Co, Eschwege*/Germanio
Responsa redakta teamo : La estraro de ISAE

**Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare**
pagebla al
a) **landa peranto** (resp. landa delegito), aŭ al
b) ISAE-konto **ĉe UEA**/*Rotterdam* (NL): **isae-z** *) *vd. sube*, aŭ al
c) Poŝtbanka konto **n-ro 140380-608 nome de ISAE-SACHS** *) *vd. sube* ĉe *Postbank Frankfurt/Main*, Germanio, Banka kodo 500 100 60

IBAN: DE76 5001 0060 0140 3806 08
BIC: PBNKDEFF

**Landaj Perantoj de ISAE**

| | | |
|---|---|---|
| Aŭstralio | *Libroservo AEA*<br>*143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.* | *<Libroservo@ans.com.au>* |
| Brazilo | *Brazila Esperanto-Ligo (BEL)*<br>*C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasilia* | *<bel@esperanto.org.br>* |
| Britio | *S-ro Paul Hewitt*<br>*26, Highfield Rd., North Thoresby*<br>*Grimsby, N.E. Links, GB – DN36 5RT* | *<paul@esperanto.freeserve.do.uk>* |
| Finnlando | *S-ino Heta Kesälä*<br>*Kalamihenkuya 3 D 32, FI-4300 Tuusula* | *<heta.kesala@pp.inet.fi>* |
| Francio | *S-ro Charles Trébouet*<br>*Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil* | *<trebouet.bohere@compagnet.fr>* |
| Irlando | *S-ino Joy Davies*<br>*9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W* | *<noviresp@eircom.net>* |
| Korea Resp. | *S-ro Cho Sung Ho*<br>*Biol.Fak.Inha Univ., KR Inchon 402-751* | *<shcho@inha.ac.kr>* |
| Norvegio | *Eldonejo Esperanto*<br>*Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo* | *<hara-ryg@online.no>* |
| Pollando | *S-ino Maria Majerczak*<br>*ul. Armii Krajowej 7 m 122, PL - 30 150 Kraków* | *<mamajer@interia.pl>* |
| Svedio | *S-ino Lisbeth Andreasson*<br>*Södra Rörum pl. 455, SE 24294 Hörby* | *<bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>* |
| Usono | *Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA)*<br>*P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA* | *<elna@esperanto-us.org>* |

***) Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b) aŭ c) (kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu sendota Scienca Revuo) la eldonanton:**
***Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio***
***Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>***